# TEJO-aktuale: numero 193, 2007-09-04

**Informa Kanalo Abonu.Com**

---

T E J O - A K T U A L E N-ro 193 (4 septembro 2007)

---

Senpaga informletero de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
<http://www.tejo.org>

---

1. TEJO SERĈAS VOLONTULON POR LA CENTRA OFICEJO
2. LIMDATO POR INFANA FABELKONKURSO PROKSIMIĜAS
3. SKRIBU POR KONTAKTO PRI EKOLOGIO
4. KLAKU - LA INTERRETA SOCIA NOVAĴO-RETEJO

---

1. TEJO SERĈAS VOLONTULON POR LA CENTRA OFICEJO

TEJO invitas vin kandidatiĝi por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo de TEJO en Roterdamo. TEJO-volontulo devas preti labori dum 12-18 monatoj kiam la periodo de volontulado de la nuna TEJO-volontulo Kasia Marciniak finiĝos, do ekde la 1-a de novembro 2007; la politiko de TEJO estas pli-malpli ĉiujare ekhavi malsaman volontulon, por ke plej eble multaj homoj povu akiri tiun sperton. Kandidatoj laŭeble parolu Esperanton tre bone (lege, skribe kaj parole), scipovu la anglan kaj/aŭ francan, profunde konu la junularan Esperanto-movadon kaj pretu kunlabori por glatigi la administran funkciadon de TEJO. La limdato por kandidatiĝoj estas la 15-a de septembro 2007 - se vi interesiĝas, serĉu plenajn informojn kaj kontaktadresojn ĉe
<http://www.tejo.org/eo/volontulu>.

---

2. LIMDATO POR INFANA FABELKONKURSO PROKSIMIĜAS

Ekde la jaro 2000 realiĝas en Finnlando internacia fabelkonkurso en Esperanto por infanoj. Estas tri kategorioj: infanoj ĝis 8-jaraĝaj, 9-10-jaraĝaj kaj 11-13-jaraĝaj. Oni sendu la konkursaĵojn poŝte kaj ili alvenu plej laste la 15-an de septembro 2007 al la Päätalo-Instituto. La adreso kaj pliaj informoj troviĝas ĉe
<http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.htm>.

---

3. SKRIBU POR KONTAKTO PRI EKOLOGIO

La ĉeftemo de la 5-a numero de Kontakto (2007:5) estos EKOLOGIO. Ni vivas en la mondo, rapide kaj aktive evoluanta; bedaŭrinde, ne ĉiam la homaro sukcesas eviti la problemojn, kiujn kaŭzas ĝia tre rapida evoluo. Tial la demandoj, rilataj al la konservado de la ĉirkaŭa medio iĝas ĉiam pli kaj pli gravaj. Ni invitas la legantojn de "Kontakto" priparoli diversajn aspektojn de ekologio kaj medi-konservado en la plej larĝa senco de tiuj vortoj. Rakontu pri viaj spertoj preventi la ekologiajn problemojn kaj komuniku pri tio, kio (ne) estas farata en via lando por eviti la ekologian krizon. La temo estas vasta kaj ege grava - do partoprenu, diskutu kaj diskutigu! La limdato por kontribui al la numero estas la 15-a de septembro; sendu ĉiujn viajn kontribuojn pri ekologio, aŭ pri ajna alia temo kiu interesas vin, al la redakcio de Kontakto ĉe kontakto(ĉe)tejo.org.

---

4. KLAKU - LA INTERRETA SOCIA NOVAĴO-RETEJO

Ĝis nun, la esperanta blogaro ne estis rekte interkonektata. La nova socia retpaĝara projekto Klaku, ekde ĝia komenco, celas esti centrala deirpunkto el kie la reta engaĝiĝo povas kreski, kaj kune kun Klaku ĉiuj aliaj projektoj ankaŭ kreskos. La retejo permesas al vi publikigi artikolojn libere, kaj la uzantaro povos kaj baloti kaj klakumi viajn eldonojn kiam la ligoj aspektos gravaj aŭ interesaj laŭ ili; ju pli da homoj klakumas iun artikolon, des pli alte tiu artikolo rangiĝos inter la aliaj. En Klaku ĉiuj rajtas publikigi novaĵojn aŭ artikolojn, videojn aŭ bildojn, skribi komentojn kaj komenti aliulajn komentojn, ktp... ĉiam libere kaj tute senpage. Vizitu, legu, skribu kaj klaku vi mem ĉe <http://www.klaku.net>.

---

TEJO-AKTUALE - Senpaga informletero de TEJO

La ideo: <http://www.esperanto.org/tejo/publikajhoj/aktuale/koncepto.html>.
La arkivo: <http://www.tejo.org/tejo-aktuale>.
La aliĝo: <http://www.abonu.com/catalog/info.tejo>
Informojn kaj komentojn sendu al <aktuale-red@tejo.org>.
La teamo de TEJO-aktuale estas:
Jevgenij GAUS, Gabriel BEECHAM.
Tiun ĉi numeron redaktis Gabriel BEECHAM.

---

http://abonu.com/ Malabonu
Retadreso: demandu@abonu.com Elektu alian kodigon